NIA PONTO

Grupo Esperantista	Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre	☎: 944.164.492
E-48005-BILBAO (Hispanio)	☎ portebla: 696.613.958
Redaktas: Jesús-Miguel García Iturrioz	🖳: tepgaitj@lg.ehu.es

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 22-1800155-0

SEPTEMBRO/OKTOBRO 2002

KUNVENO / REUNIÓN.

Unu fojon plian ni troviĝas ĉe la sojlo de nova instrujaro. Kiel ĉiujare, estas tempo por pripensi nian agadon dum la venontaj monatoj: precipe, E-kursoj, propagando, vendado de loterio, ...

Kun la celo pritrakti tiujn kaj aliajn aferojn, ni kunvokas vin ĉiujn la **vendredon 13an de septembro, je la 19,00 h.**, partopreni kunvenon laŭ la ĉi-suba tagordo:

1. Organizado de E-kursoj.
2. Propagando en la amaskomunikiloj.
3. Kristnaska loterio.
4. Sugestoj kaj demandoj.

No lo olvides: el próximo **viernes 13 de Septiembre, a las 19,00 h.**, reunión en el Grupo para tratar, principalmente, sobre la organización de nuevos cursos de Esperanto y la venta de la lotería de Navidad. Esperamos contar con tu asistencia y ayuda.

TTT-PAĜO DE NIA GRUPO.

Nia amiko Patxi de la Hoz nun prilaboras TTT-paĝon por nia Grupo. Ni esperas baldaŭ diskonigi la agrablan novaĵon de ĝia naskiĝo en Interreto.

KURSO EN LA VASKA UNIVERSITATO.

Jam la duan jaron, en majo finiĝis nova oficiala kurso de Esperanto en la Vaska Universitato ("Universidad del País Vasco/Euskal-Herriko Unibertsitatea). Sub la titolo "*Lenguas planificadas: Esperanto*" ("*Planlingvoj: Esperanto*"), ĝin partoprenis 25 gelernantoj; temas pri unu el la tiel nomataj "libervole elekteblaj studobjektoj" kaj daŭris 45 horojn.

La gelernantoj ne estis speciale entuziasmaj pri la ideo plu lerni Esperanton, sed kelkaj el ili scivolemis pri la E-movado, ĝia historio, la diversaj ebloj uzi Esperanton dum la ĉiutaga vivo, ktp.

E-KUNVENOJ.

Jam finiĝis somero kaj, kiel ĉiam, ĝi estis plenplena de E-aranĝoj. Tiel ke UK kaj IJK okazis en Brazilio, ĉi foje ne multe da bilbaoanoj havis la eblecon ĉeesti renkontiĝojn. Tamen, unu el ili partoprenis la SAT-kongreson, okazinta en Alicante, kaj du el ili veturis ĝis Verona (Italio) por partopreni la eŭropan kongreson.

KRISTNASKA LOTERIO / LOTERÍA DE NAVIDAD.

Ne forgesu ke, se ĉio iras glate rilate la presadon de la kvitancoj, ni planas komenci ilian vendadon meze de oktobro. Kiel ĉiam, via helpo estas tre bezonata.

No olvides que, hacia mediados de octubre, estarán listos los billetes de la lotería de Navidad. Como siempre, la ayuda de todos, para su venta, es más que necesaria.

Pago de cuotas 2002.

Si a derecha de estas líneas aparece una "X" en rojo, es que aún no has pagado tu cuota de socio correspondiente al año 2002. Recuerda que, para este año, las cuotas son:

Reducida: 14 euros (Jubilados, estudiantes, parados, etc.)
Normal: 17 euros
Familiar: 30 euros (cuota única para todos los socios que habiten en un mismo domicilio).

El pago se puede hacer en la BBK, cuenta nº 2218001550 (no olvides hacer figurar tu nombre), o en el Grupo, donde estamos los viernes de 7,30 a 9.

J. CHIRAC KAJ ESPERANTO.

La 15an de aprilo 2002, Jacques Chirac, prezidanto de Francio skribis jenon al Vincent Charlot, konata franca esperantisto:

Kara Sinjoro,

Vi bonvolis altiri mian atenton pri la problemo de Esperanto, kaj mi dankas vin pro tio ĉar, kiel vi jam scias, temas pri afero pri kiu mi estas sincere favora.

Eĉ se pro kialoj, kiujn vi facile komprenos, mi deziras antaŭ ĉio min dediĉi al la defendo de la francparolantaro, mi havas profundan simpation por Esperanto kaj la humanista projekto, kiu direktis ĝian kreiĝon kaj kiu pli ol iam ajn animas ĝiajn hodiaŭajn defendantojn.

Mi opinias miaflanke, ke la progresado de Esperanto, en la respekto de la kultura diverseco, kiu estas nedisigebla de ĝi, estus potenca faktoro de harmonio kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Estas tute sendube ke, se la sorto de la urnoj estos al mi favora, mi submetos al la venonta registaro, kaj aparte al la ministro pri nacia edukado, la demandon pri ĝia inkludado kiel elektebla lernobjekto en la abiturienta ekzameno, aparte pro la deziroj eksprimitaj fare de la gelernantoj kaj gepatroj, kaj pri la ebleco varbi sufiĉe da kompetentaj ekzamenantoj.

Mi petas vin kredi, kara sinjoro, je la esprimo de miaj plej bonaj sentoj.

Plej kore,
Jacques Chirac.

("Eventoj". 2/aprilo-2002)

... KAJ ANKAŬ LA VERDULOJ.

La eŭropa federacio de verdaj partioj, kongresinte en Berlino de la 17ª ĝis la 19ª de majo, en sia rezolucio "lingvoj en danĝero" rememorigis pri la cirkulero de 1995 far de la itala ministro pri Edukado favore al Esperanto; kaj invitis "*al ĉiu partio aliĝinta diskonigi ĝian enhavon ĉe la Edukministerio kaj ceteraj institucioj rilatitaj de la propra lando, kaj antaŭenpuŝi la eksperimentadon kaj eŭropan rekonon de la metodo Paderborn" (instruado el lingvistika vidpunkto)*, kiu "*per enkonduko de Esperanto faciligas, dank' al tempo-enspezo, la lernadon de aliaj lingvoj*".

("Le Monde de l'Esperanto". Mai-juin 2002)

E-RENKONTIĜO EN CAMBRILLS (Tarragona).

Niaj samideanoj el Sabadell informas pri okazigo de nova Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo, jam la 10ª. Ĉi jare ĝi okazos en Cambrills (Tarragona), fama turisma urbo, de la 19ª ĝis 26ª de oktobro. Inter la partoprenantoj estos la nuna prezidanto de UEA, Renato Corsetti, kiu prelegos pri "UEA, faktoj kaj celoj".

Aliĝo kostas 24 eŭrojn kaj restado en hotelo kun tri manĝoj, 30 eŭrojn tage en dulita ĉambro (36 en unulita).

Informoj: Santigo Torné. Ap. 423; 08200-SABADELL (Barcelona).
Tel.: 937.253.421
Rete: luis_serrano@e-milio.com

MALMULTEKOSTAJ LIBROJ aĉeteblaj en nia Grupejo:

Ni rememorigas pri du verkoj, kiujn eblas aĉeti ĉe nia Grupejo tre favorpreze kaj kiuj povas esti ĝuinda donaco por viaj geamikoj eksterlandaj:

- La unua estas "Omaĝe al Aldecoa", eldonita de Alava E-Asocio, kiel omaĝo al alava verkisto Ignacio Aldecoa. Trilingva (hispane-vaske-esperante), 69-paĝa. Ĝi kostas nur 4 eŭrojn (plus sendokostoj).

- La dua estas la ege fama "La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha". Tradukita de Fernando de Diego, estas impona 820-paĝa verko, ilustrita per 20 gravuraĵoj de Gustavo Doré. Prezo: nur 12 eŭroj (plus sendokostoj).

NOVA PIV.

Dum la lasta SAT-kongreso (Alicante, 1/7 julio 2002), estis prezentita la nova eldono de la Plena Ilustrita Vortaro (PIV). Ĝi enhavas 1264 paĝojn kaj pli "afablan" aspekton ol la antaŭa; ankaŭ estas vere "ilustrita", ĉar enhavas multe da altkvalitaj desegnoj. Certe tre grava verko por la esperantistaro. Ĝia nuna prezo estas 70 eŭroj kaj ĉiuj interesitoj povas ĝin mendi pere de la respondeculo de nia libroservo, Iñaki Vélez. (Tel: 696 613 958)

MAZI EN GONDOLANDO denove aĉetebla. La plej sukcesa vidbenda kurso, esperantigita laŭ sukcesa metodo de la prestiĝa BBC, estas denove en la merkato, ĉi-foje kontraŭ duona prezo de 39 eŭroj (antaŭe, 81,68 eŭroj).

(Reklamo en "Esperanto". N-ro. 1148 (6). Junio 2002)